

Dumonata kultura informilo k esprimilo esperantista. 2,50 FF
N° 31 (49) - Decembro 1980.

ISSN 0150-5823



Eldonas : Cercle espérantiste de * Abono por unu jaro : 15 FF
l'Agenais, F 47340 LAROQUE * (12 FF por Francio)
Poŝtkonto : 3 371 74 M Bordeaux * al la ĉi-apuda pĉk.

ENHAVO

2. Esperanto-gramoj (Antoni Madej)
3. Debat-enkonduko : La Mono. Maljunulo rakontas (-nn-)
Suzana liveras dokumenton (teksto de C.Berneri)
7. Ĉu en Francio krei F.E.A.n ? (la vidpunkto de R.Pons)
9. Tra Eŭropo per fervojo kaj Esperanto (Jakelino)
14. Larzako - Golfech (Nicole Déjean)
15. Vivo de "Laŭte!" (Kribo)
17. Nia felietono : Tra la mondo per biciklo (Alfa-Beta)
19. Pri strategio kaj taktiko de nia asocio (SAT) (S.P.Hurtta)
20. Raporto pri la Internacia Renkontiĝo de Junaj Geesperantistoj en Villenave d'Ornon (Girondio)
23. SAT-broŝurservo (Kribo)
24. Ĝisrande pleniĝis la pokalo ! (P.kaj G.Signoret)
25. La Brita Konsilio donas antaŭrajton al Pekino (E-centro Hillingdon). 26. Anoncetoj.
27. La Kastelnova Grupo 1. (Nia unua desegno, ve, fuŝe represita!)

Meze, la kolorpaĝoj I/IV : Esperanto-Vivo. Ĝis 1981 !

Antoni Madej : E S P E R A N T O - G R A M O J

x x x

Ĉiun porkon
atendas forko.

x x x

Homo tre elokventa,
Ne ĉiam hom' prudenta!

Esperanto sanigas

Se vi volas eviti sankrizon
Por Esperanto pagu kotizojn!

Okazis, ke...

... pro la duka logo
Ĉi forgesis dekalogon.

Diversaj esperoj

Ne nur esperantista espero
ke, la Tero fariĝu E-tero.

Kun...

Kun najbarino afabla
eĉ stulta babilad' agrabla.

El sonĝo

Preskaŭ mi pekis
Sed l'edzin' min vekis.

Postnupta nekto

Jen la provo
de l'alkovo.

Pri papilio

- Vi kien flugas papili' ?
- De Lilio al Lili' !

Pri rekono

Ne ĉiam honorario
Estas la honor-ario !

Nuntempa familio

Ege strangas nuntempa famili':
Unu infano, da gepatroj tri.

?

Ĉu ne estas instigoj
por elesperantigoj ?

Ankaŭ...

Ankaŭ doloroj
havas valorojn !

Vivu agreso

Por de la movado progreso
Vivu Esperantista Agreso !

Pantomimo

En la mond'
regas ĉi kutimo.
Ĉiuj en rond'
faras pantomimon.

ABZ de Amo kaj Pioniro

Polvkovrita sur bretaro
Putras lia am-vortaro.
Tedas lin la amakiroj,
Estas li jam pioniro !

Al Ikaroj

Memoru ! Kuraĝa
Ne signifas saĝa !
Ĉar ankaŭ Ikaro
Falis en la maron !

Eĉ...

Eĉ el bela lipruĝo
Eliĝas malbela muĝo !

Furzo

La fugo
de l'pugo.

LA MONO

Maljunulo rakontas...

Post 60 jaroj da streĉa laboro en tre multaj firmoj, en nia kaj aliaj landoj, mi kolektis grandan sperton, ne nur pri mia metio, sed ankaŭ en najbaraj metioj. Interalie, pri kontoj de direktoroj aŭ kontistoj, kaj ankaŭ pri iliaj rilatoj kun la fisko.

Mi laboris en aferoj, kies direktoroj aŭ kontistoj por pagi prenis ŝlosilon, malfermis monŝrankon, faris la pagon, enskribis en unu flanko de la libro de la monŝranko la kialon de la pago, refermis la monŝrankon per la ŝlosilo kaj daŭrigis sian laboron...

Kiam iu venis por pagi, la direktoro aŭ kontisto reprenis la ŝlosilon, malfermis la monŝrankon, deponis la monsumon, denove enskribis - sed tiun fojon en alia flanko de la libro de la monŝranko - la kialon de tiu gesto, zorge refermis la ŝrankon per ĝia ŝlosilo kaj poste oni tiris el tiu ĉi farado la "registradon de kontoj" de tiu afero...

Mi laboris ankaŭ en aliaj aferoj, kie la estro anstataŭigis la monŝrankon per sia poŝo. Unuvorte, li pagis per unu mano kaj ricevis per la alia. La kontisto faris ankaŭ sian laboron.

Rezulte, mi ellernis, ke tiu, kiu ricevis per unu mano kaj pagis per la alia, fariĝis grava riĉulo, dum la alia, tre zorgema en skribado, foriris en nokton kaj nebulon, sen mono kaj sen honoro.

-nn-

Suzana liveras dokumenton...

Jam mi antaŭvidis sendi iam tiun ĉi-postan artikolon, kiu aperis en gazeto de majo 1937. La diversaj demandoj de Roberto pri ŝanĝoj en la homsocio (en "Laŭte!" n-ro 28/46, p.4-5) instigas min tuj ĝin sendi.

Multaj el niaj samtempanoj deziras ŝanĝon de la sociordo, sed ili ne povas koncepti homsocion, en kiu ne ekzistus la profito. Unue, ĉar dum multaj jarcentoj la socio estis bazata

sur la profito. Due, eĉ tiuj, kiuj bone konscias pri tia plago, kiu naskas la plej gravajn agadaĉojn, opinias, ke senmona socio estas nerealigebla, ĉar ili ne havas(is) la okazon, aŭ la emon, legi tekstojn filozofiajn pri tiu temo.

Tiu sinteno estas bremsilo sur la vojo al plibonigo de la Homaro. Roberto aludas pri tre diversaj ŝanĝoj en iuj landoj, kies rezultoj estas ĉiam aĉaj. Tiaj... ŝanĝoj nur ŝajnas ŝanĝoj : ĉiuj ŝtatoj sin apogas sur la sama bazo. Estas dezirende ŝanĝo, ne ŝanĝoj.

Inter la opinioj aŭ proponoj, pri kiuj Roberto demandas, estas "la malaperigo de la ŝtato" : "Ĉu tio vere sukcesis en iu ajn mondparto ?"

Pri komuna vivo, bazata nur sur la bezono, mi legis antaŭ pluraj jaroj, ke loĝantoj de iu insulo, kies nomon mi ne plu memoras, produktas nur la necesan kvanton por ĉies vivo, kaj iomete pli : eta kromaĵo. Tiuj homoj estas inteligentaj... ili havas la tempon... vivi.

La ĉi-suba artikolo estas parto de longa artikolo pri nova socio. Se mi bone memoras, dum la hispana milito, ie oni spertis tion, ĉar tio bone funkciis.

Suzana

C. Berneri : L A M O N O

La forigo de la mono, en ĝia nuna formo, estas nepre necesa, se oni volas detrui la profitamon kaj la komercomanion. La akumuladon kaj la kapitalismon kaŭzas ja la mono, kaŭzo de tiom da konfliktoj inter individuoj kaj inter kolektivoj. Ĝi estas la certa faktoro de malaltiĝo de la morala nivelo. Tamen, antaŭ ol la nova socio atingos sian celon, t.e. antaŭ ol la abundo ebligas disdonan ekonomion (kaj per tio ni komprenas senpagan distribuon de ĉiuj produktoj kaj objektoj), verŝajne pasos iu periodo de organizado kaj adaptado.

Kaj do, tiom longe dum la abundo ne sufiĉos por ebligi tian senpagan distribuon, dum iu tempo oni daŭrigu la interŝanĝon de la konsumotaj produktoj kontraŭ mono.

La valoro de la mono estos kalkulata laŭ la kvantoj da konsumeblaj produktoj, laŭ la kvanto da laboro, kiun ili postulis, kaj laŭ la mendoj de la konsumantaro. La interŝanĝo do provizore pludaŭros.

Kaj ĉiufoje, kiam produkto fariĝos sufiĉe abunda, tiam oni ĝin donos al la konsumanto sen ajna pago kaj sen limigo.

Sed tiu provizora interŝanĝo, senigita je ĉia spekulacico, helpas la distribuon nur kiel ties regulilo. Ĝia nura celo estos ebligi al la individua libereco manifestiĝi, malfirmigante nek la ekonomian ekvilibron nek la egalecon en ties ĝusta senco. Ĉar la vera egaleco kaj la respekto al la libero ne povas kuŝi en norma fakigo de la individuaj bezonoj nek en reglamentata aŭ matematike kalkulata konsumado laŭ porciuma metodo, kiun ni anticipe kontraŭas per nia tuta forto. La samaj aĵoj povas havi tre malsaman valoron laŭ la individuaj preferoj kaj bezonoj.

Pri la konsumado, la egaleco kaj la libereco precipe kuŝas en la ebleco por ĉiu elekti mem la produkton, kiun li volas konsumi. Kaj tiu ebleco nur la mono ebligas garanti tii dum la periodo de organizado. Do, dum kelka tempo la kreditejoj (sed ili ne havas la saman karakteron kiel la nunaj bankoj) estos utilegaj. Ĉe montrado de la notlibro de la konsumanto, ili donos al la interesato monon proporcie laŭ la konsumado ebligata per la entuta produktado.

Tiu kvanto da mono estos la sama por ĉiuj, kiu ajn estos la funkcio de ĉiu. Ĉiu individuo havos la eblecon uzi sian monon laŭplaĉe. Sed por forigi ĉiun ajn ekpenson pri ŝparago aŭ kapitaligo, tiu mono validos nur dum limigita periodo. Poste, ĝi ne plu estos akceptata. Tiel, periode, nova monbiletaro estos eldonata, kiu nuligos la antaŭan. La konsumanto havos kiel nuran intereson foruzi la tutan monon disponeblan. Kaj li faros tion des pli volonte, ke la socio malavare certigos la vivrimedojn al ĉiuj familianoj, produktantoj aŭ ne.

Se la konsumanto deziras akiri aĵon postulantan multe da laboro, ekzemple aŭtomobilon, li, indikinte al sia banko la objekton, kiun li deziras, povos antaŭ la nuligo de ĉiu eldonita monbiletaro, deponi certan kvanton el tiu ĉi mono. La kreditejo povos eĉ konsenti la necesan antaŭspezon.

Kiel videble, tia foriĝema mono, kvankam ĝi ebligos plej kompletan liberon en la elekto de la produktoj, malpermesos ĉian spekuladon.

Oni antaŭvidu, ke, ĉe la komenco, iuj fakoj de la produktado ne povos kontentigi ĉiujn mendojn. Sed la konsumantaro, pere de siaj federitaj kooperativoj, konigos la plej urgajn bezonojn. Tiam, tiuj produktadoj fariĝos momente

prioritataj, kaj ili celos igi senpagaj aŭ etkostaj, kiel eble plej rapide, la produktoj aŭ objektoj plej necesaj al la vivo.

Laŭmezure kiel intensiĝos la produktado en ĉiuj kampoj, ĝeneraliĝos la senpaga distribuo. Kaj la mono, malpli kaj malpli uzata, iom post iom malaperos dank'al tiu intensiĝo de la produktado.

Oni eble tiam rebatos al ni, ke ĉiam estos individuoj, kiuj ne volos labori, tamen volos konsumi, kaj faros falsajn notlibretojn de konsumantoj, aŭ fabrikos falsan monon. Ne. Estus tute freneze, tiel stulte perdi sian tempon, tial, ĉar :

1. la fakto, ke la mono estos ^{foriĝema} kaj ke la monbiletoj tre ofte ŝanĝiĝos, havigos al la monfalsistoj pli grandan laboron ol tiu, kiun la socio petos de ili.
2. la sama rebato validas pri la notlibreto de konsumanto.
3. saĝe, oni sin demandas, kiu, en socio kie la individuo povos kontentigi ĉiujn bezonojn, komplikos sian vivon, aĉetante falsajn notlibretojn aŭ falsan monon ?
4. aliflanke, la revolucio estus senutila, eĉ nedezirinda, se ĝi ne alportus, sekve de la taŭgaj aranĝoj kaj fundamentaj transformoj, kiujn ĝi supozigas, plialtiĝon de la intelekta kaj morala nivelo de la individuoj. Ankaŭ pri tio - eĉ se hodiaŭ (ĉ. 1936) oni mokus - ni kalkulas por eviti ĉian entreprenon de "elturniĝemo" kontraŭ la kolektivo.

C. Berneri

La ĉi-supra teksto estas parto de longa artikolo ("Socia Problemo, Nova Socio) de Kamilo Berneri, murdita en Hispanio, majo 1937. La hispana provinco Aragono dum pli ol unu jaro vivis sen mono, en revolucia periodo.

" La delegitoj de la distribuo kaj de la produktado estos la "plej bonaj" senpere elektitaj de la konsumantaro kaj de la produktantaro. Ili estos delegitaj provizore ĉe iuj postenoj, el kiuj ili estas anstataŭigeblaj je ĉiu momento. Tiuj delegitoj elektos inter si la plej kapablajn por fariĝi konsilianoj en administraciaj konsilioj komunumaj, regionaj, naciaj. Tiuj provizoraj delegacioj estos submetataj al la rendimento de ilia laboro, al la volo de la konsumantoj. En tia etoso, estus neeble, ke kresku la burokrateco, ĉar ĉie estas kontrolo kaj la produktokvanto estas la mezurilo de ĝia kapableco. La administrado ne

plu estas kariero ; ĝi fariĝas entrepreno limigita en siaj celoj, sekve en estonteco.

La ŝtata administrado forĝas novan klason de privilegiuloj : la burokratoj. La administrado de la aĵoj malebligas tiun eventualaĵon."

***** Red. : Jen prezentita nova temo por la debatemuloj. Bonvenon al ĉies kontribuoj ! *****

Kaj nun, pri nia antaŭa debato :

"Ĉu en Francio krei Francan Esperanto - Asocion?"

la vidpunkto de R. PONS, membro de UEA kaj UFE :

"...Antaŭ ĉio detalo ĉagrenas min : la dato (de la letero al s-ro Bertin, NdLR.) menciita : "1979 08 03". Verŝajne mi estas terure rasista kaj egoista, ĉar mi grumblas ĉiam, kiam mi trovas angla-usonon vorton francizitan ; ĉar mi kons-tatas, ke la propagando farita por altrudo de tiu fremda lingvo eĉas terure ĉe la "mass media" (informiloj). Do tiu invado de anglaj vortoj estas kunligita kun tiu nepraktika modo (certe de sama deveno), kiu konsistas legi ĉiujn nombrojn same kiel ĉe ni : de maldekstre. Sed por bone kompreni la menciitajn datojn, oni devas legi de dekstre ! Kiam oni havas la cerbon iom laca, tio ne faras pli facilan kalkulon, kaj la okuloj de la legantoj moviĝas kiel por la spektantoj de pilkludo : dekstren, maldekstren... Ni povas preskaŭ nenion fari pri la invado de "amerikanismo" en nia lingvo ; ni provu gardi (same kiel estas skribite en la 3a linio de tiu artikolo: 2a de junio 1979, anstataŭ 1979 junio de 2a !!! aŭ 1979 06 02!

Do jen, paragrafon post paragrafo, mia opinio pri la aperinta artikolo en "Laŭte!" :

- * Krei novan organizon en kiu partoprenos ĉiuj esperantistoj, kiujajn estis la motivoj de lernado de la I.L., estus, laŭ mi, grava eraro.
- * Estu pli da kontaktoj inter la E-asocioj, jes ; tio ebligus pli da informoj, pli da amikeco inter samlingvanoj. Pri tiu punkto mi opinias, ke ne estas necese krei novan organizon, nur kelkaj leteroj, kelkaj vortoj de aliuloj sufiĉos por krei tiun dezirindan kontakton inter ne samaj organizoj ; ĉar jam ekzistas multaj bultenoj, ĵurnaloj, naciaj, inter-

naciaj, regionaj. Evidentas, ke politiko, religio, aŭ simple raciismo disdividas la tutan homaron. Tamen tio ne gravas, kiam temas pri homoj, kiuj havas sufiĉe da homamo por respekti aliajn opiniojn.

* La kontaktoj inter la estraroj de diversaj organizoj estas afero de ili mem. Neniu rajtas perforti la estraranojn pro ilia sinteno.

* Jes, la plimultiĝo de E-asocioj estas dezirinda, ĉiu pli bone kapablas varbi en sia speciala organizo.

* Mi ne komprenas kiamaniere ununura libroservo en Parizo povus faciligi ĝian vendpovon. Multaj E-asocioj, aŭ fakaj organizoj, havas sian libroservon, kaj mi uzis, ĝis nun, kun kontento la bonvolemon kaj la rapidemon de 3 el ili.

* Referendumo estas granda vorto, kiu ofte signifas malmulton. Kiel vi, ankaŭ mi opinias, ke multaj E-istoj ne estas agemaj!...

* Pri la sinteno de Duc Goninaz, tie kuŝas memdecido. Ĉu li vivtenas sin per E^o ? Mi diros : bonege, ĉar tio pruvos ke E^o kapablas "nutri sian homon". Malfeliĉe mi opinias, ke s-ro Duc Goninaz devas certe havi alian "hobion". Sur tiu kampo mi neniam povis agnoski, ke ĉiuj esperantistoj devus esti sindonemaj, sen pripensi al sia vivo. Mi aŭdis ankaŭ saman kritikon kontraŭ s-ro Delaire. Mi gratulas lin, ĉar li multe laboris por nia I.L. kaj bonege propagandis ĝin eĉ eksterlanden.

* Mia konkludo estas en akordo kun la konkludo de nia amiko en Laŭte : Ni laboras por ke E^o estu plidisvastigita, ke ĝi estu oficiale agnoskita en ĉiuj landoj. Ĝi utilos al ĉiuj, kiuj deziras havi kontaktojn kun eksterlandanoj, alilingvanoj. La motivoj estas certe variaj ; same kiel iu ajn lingvo en la mondo, ĝi povas utili same al politikistoj, al manlaboristoj, al intelektuloj, al ŝakludantoj, ktp... Esperanto estas nur lingvo, kaj Ezopo (se mi bone memoras) diris : La lango estas la plej bona kaj la plej malbona aĵo. Mi aŭdacas diri same pri la lingvo !

Raymond Pons

Respondo de la redaktanto pri la maniero skribi datojn : "1979 08 03" povas ja aspekti "usonismo", sed tio ĝi ne estas. Ĝi estas la maniero skribi daton laŭ de kelkaj jaroj tutmonde agnoskita konvencio internacia.

TRA EŬROPO per FERVOJO
kaj ESPERANTO ... (daŭrigo)

En Radkow ni iris al la urbodomo, kie estas pluraj oficoj, interalie la milicio. La deĵoranto por informado ne sciis kion fari pri mi kaj menciis al mi plurajn aliajn oficojn. Sed la oficistoj ĉiuj iris for, kaj finfine, trovinte neniun, kiu konsentas zorgi pri mi, ni revenis al la informanto. Eugeno kaj li longe diskutis, kaj Eugeno diris al mi : "Li demandas, kion li devas fari". Mi respondis, ke mi ne scias, ke diris la konsulo en Strasburgo, ke antaŭ la fino de la dua tago de mia restado en Pollando mi iru al polico aŭ milicio, ke hodiaŭ estas la dua tago, ke bonorde mi min prezentas, ke se la pola milicio ne scias, kio estas pri alilandanoj en leĝoj de la pola popola respubliko, pli bone ol pola miliciano ne povas scii mi alilandanino, kiu ne venis al Pollando por doni kurson de profesia formado al la pola polico. Ĉion tion mi diris en Esperanto kun mia kutima parolrapideco, kaj mi petis de Eugeno, ke li insistu. Mi pensis, ke estas sabato, ke mardo estas Kristnasko, ke en Strasburgo Walter diris, ke la 24a de decembro estas tre grava katolika festo, kiun konas ĉiuj polaj ateistoj, kaj kiun ŝajne konas neniun katoliko ekster Pollando. Tial mi volis havi miajn paperojn en ordo, pro timo, ke, se mi irus al la polico la 26an en Krakovo, ĝi riproĉus, ke mi alvenas tro malfrue. La radkova miliciano estis perpleksa, ĉar, kvankam verŝajne tion ne malpermesas la konstitucio de la popola respubliko pola, videble mi estis la unua franca skizofreniulino, kiu iam ajn havis la ideon alveni en Pollando marŝante sur sudeta neĝo dum decembra nokto. Fine li skribis sur mian vizon ion, kion mi ne komprenis, sed kio verŝajne signifis, ke mi venis, ke min li vidis, kaj ke lin mi bone embarasis. Li stampis, kaj ni eliris.

Poste ni iris al gastejo. En la gastejo estis la fratino de Eugeno, Bernadette, kun sia edzo, Andreo, kaj lia patro. Eugeno diris, ke Bernadette laboras en tiu gastejo, sed ke nun ŝi ne deĵoras. La maljunulo bone parolis la germanan, kaj, dum ni babilis, Eugeno drinkis por rekuraĝiĝi post niaj policejaj aventuroj. Subite oni alportis al mi ion por manĝi,

mi miris, ĉar estis nur la dua horo, sed Andreo signis, ke mi manĝu. Bernadette kaj ŝia bopatro foriris, kaj restis nur Eŭgeno, Andreo kaj mi. Eŭgeno leviĝis, sed li ŝanceliĝis, kaj nur tiam mi rimarkis, ke li estas tute ebria. Ĝojinde, tion Andreo estis rimarkinta antaŭ mi, li helpis al sia bofrato leviĝi, kaj kondukis lin kaj min al sia apuda loĝejo, kie li kuŝigis Eŭgenon sur kanapon.

En bona situacio mi estis ! Eŭgeno kuŝis sur la kanapo, kaj mi sidis kun Bernadette, Andreo kaj ilia fileto. Mi ne parolis la polan, kaj la tri aliaj ne parolis Esperanton. Andreo montris per gesto, ke Eŭgeno estas tute ebria, sed tio estis sufiĉe videbla. Li demandis min, je la kioma horo mi devos esti en Klodzko, kaj mi respondis duone en germana lingvo, duone per gestoj, ke mi devos preni la valizon en Wambierzyce kaj eliri de tie per la buso de la 5a horo. Andreo diris "tak", kaj mi miskomprenis, ke li diras "Guten Tag" en la germana. Nur poste mi eksciis, ke "tak" signifas "jes" en la pola. Mi jam sciis, ke "tak" signifas "dankon" en la dana lingvo, ja poliglota mi estas, sed foje la internacia komunikado metas problemojn eĉ al poliglotoj. (Noto : pri la ortografio de la dana kaj pola vortoj mi tute ne certas). Sed la miskompreno donis al Andreo la ideon pruntepreni de najbaro vortaron polan-germanan, ĉar tio estas pli facile trovebla en Radkow, ol franca vortaro. Post lia foriro, mi restis sola kun Bernadette kaj la knabeto. Ni rigardis la televidon. En decembro la pola televido montris felietone la filmon "Grandaj manovroj" kun Gérard Philipe. La sono estis en franca lingvo, sed pola komentisto tradukis, kion diris la francaj aktoroj, kaj, ĉar li parolis pli laŭte ol ili, mi komprenis plu nenion, krom, ke temas pri soldatoj kaj virinoj. Mi rigardis la loĝejon, ĝia nivelo estas pli alta ol en la domo de Eŭgeno, ĝi sufiĉe similas loĝejon de laborista familio en Francio. Post momento la knabeto bruis por veki sian onklon, kaj, post longa klopodado li sukcesis tiri la grumblantan Eŭgenon el la brakoj de Morfeo. Eŭgeno vestis sin kaj, sen peti ekskursojn, diris, ke ni tuj revenos al Wambierzyce. Revenante kun la vortaro, Andreo vidis lin starantan, kaj pro prudento venis kun ni. Ĝustatempe ni alvenis en Wambierzyce, kaj en la salono mi parolis kun Eŭgeno, lia patro kaj

Andreo. Andreo volis scii, ĉu en Francio ekzistas fiŝkaptiloj. Mi respondis jes, kaj, ĉar mi miris pro la demando, Eŭgeno diris, ke en Pollando fiŝkaptilo estas malfacile trovebla en vendejo. Andreo volis doni al mi zlotojn, por ke mi sendu al li fiŝkaptilon. Ĉar da zlotoj mi havis jam tro, mi respondis, ke mi tute ne scias, kio estas la prezo de fiŝkaptilo (kio cetere estas vero). Finfine ni interkonsentis ke, kiam Eŭgeno vizitos min en majoj, li aĉetos fiŝkaptilon por Andreo, krom aŭtomobilo por si. Mi respondis, ke la fiŝkaptilon Eŭgeno povos verŝajne aĉeti kaj elporti, se li havos sufiĉe da francoj, sed ke pri aĉeto de aŭtomobilo li prefere ne havu iluziojn. Eŭgeno respondis, ke li povos aĉeti aŭtomobilon, se li laboros, kaj mi plu provis klarigi al li la problemon de laboro en mia kapitalista lando, sed ree vane. Mi pakis la valizon, lasante al Eŭgeno diskon de elzaca grupo "La Manivelle" kaj la por mi senvalorajn ĉeĥajn-slovakajn kronojn. Ni iris por la buso de la kvina horo, sed, kiam ni alvenis, ĝi jam estis for. Ĉar mi nervoziĝis dirante, ke Walter min atendas en Rzeszow por la sama vespero, Eŭgeno retransviligis min dirante, ke estos buso ankaŭ je la sepa horo. Finfine mi bonorde alvenis en la stacidomo de Klodzko longe antaŭ la forveturo de la trajno al Krakovo. Laŭ la konsilo donita al mi de Walter, mi volis aĉeti bileton de unua klaso por pli komforte vojaĝi en plenplenaj trajnoj, sed Eŭgeno insistis, ke estas lia devo kiel gastiganto pagi mian bileton. Tial mi retrovis min kun bileto de la dua klaso. Eŭgeno mendis kolbasojn kun fazeoloj kaj insistis, ke mi manĝu antaŭ ol vojaĝi. Li adiaŭis min ĝustatempe por uzi la revenbuson al Wambierzyce, kaj mi restis atendanta la trajnon.

Kludzko - Rzeszow - Varsovio

En la kristnaska tempo, poloj tiom emas vojaĝi, kiom francoj. Ĉar da aŭtomobiloj ili havas malpli, pli plenaj estas iliaj trajnoj. Kun mia bileto de dua klaso, mi unue staris en la koridoro, poste povis sidi, ankoraŭ en la koridoro. En tiu plenplena nokta trajno neniu provis dormi. Audante virojn kanti, mi rigardis tra la fenestro de la kupeo, kaj vidis, ke ili estas drinkantaj vodkon.

La trajno alvenis frue en Krakovo, tamen malpli frue, ol estis menciite sur la hortabelo. Mi iris al la poŝtejo por sciigi al Walter, ke mi estas alvenanta, kaj lin peti, ke li

plu atendu. Ĉar Walter estis dirinta al mi, ke en Polio ne facilas telefoni al alia urbo, mi sendis telegramon en Esperanto, kiun la deĵorantino akceptis senprobleme. Poste mi sidis en la atendejo, ornamita de la pola aglo kaj de bildoj reprezentantaj pejzaĝojn, ĝis la oficiala horo de la alveno en Krakovo de la trajno de Gdansk al Przemysl. Longe mi atendis tiun trajnon sur la kajo, ĉar ĝi alvenis kun unu horo da malfruo. Kiam ĝi alvenis, ĝi jam estis plenplena, kaj staris sur la kajo amaso da vojaĝantoj. Mi provis puŝi, sed la trajno foriris, antaŭ ol mi sukcesis eniri en ĝin. Mi cerbumis, ĉar tiu malagra-blaĵo ankoraŭ neniam okazis al mi ; iam en Francio nokta trajno de Strasburgo al Ventemiglia elreliĝis, dum mi kuŝis en ĝi, sed ke mi ne povis eniri, tio okazis al mi nur kun la subtera trajno en Parizo.

Irante informiĝi pri la horo de la venonta trajno al Rzeszow kaj aĉeti bileton de la unua klaso por pli facile eniri, mi rimarkis, ke manovras sur kajo iu "sputniko" kun ŝildo "Krakow-Przemysl" (en GDRa slango, "sputniko" estas duetaĝa trajno, kiu kutime haltas en ĉiuj stacidomoj). Mi ne sciis, ĉu mi povos eniri en la unuan klason de plenplena trajno, kaj konjektis, ke en la duan klason de la "sputniko" mi povos iri, ĉar ĝi estas malplena. Mia konjekto montriĝis vera : kun mia mallerteco kaj mia dika valizo mi ne sukcesis kapti sidlokon, sed enirante mi vidis, ke estas en la kupeo por starantoj benko por 6 gluteoj okupita nur de du sinjorinoj. Tiel mi alvenis en Rzeszow je la tria horo posttagmeze.

Esperante, ke Walter min atendas, mi iris al la ĉiam malfermita ofico de telefono. La aŭtomato ne funkciis, sed honeste redonis al mi mian zloton. Afablega junulino kun dorsosako donis al mi konsilon en angla lingvo, sed ankaŭ ŝi ne sukcesis konvinki la maŝinaĉon, ke ĝi konstruu socialismon. Tial ŝi parolis al la deĵorantino, sed ankaŭ la profesiulino ne povis atingi la numeron. Ŝi konsilis, ke mi certigu pri la numero. Telefonlibro ne estis en la poŝtejo, sed la listo de ĉiuj telefonabonantoj de Rzeszow estis afiŝita sur muro, tiel mi konstatis, ke la patro de Walter loĝas je la menciita adreso, kaj, ke la numero estas ĝusta. Sed post klopodo, la poŝtistino diris kun resignacia tono, ke ne volas funkcii la telefono.

Rapide mi trovis taksion, kaj, doninte bonan drinkmonon en por mi senvaloraj zlotoj, mi decidigis la veturiston porti la valizon ĝis la ĝusta pordo. Ĉeestis nur la patrino de Walter, kiu parolas nek Esperanton nek la germanan, kaj mi komprenis nur, ke Walter estas en Varsovio. Ĉar post 15 horoj da vojaĝo sen dormi, sen manĝi kaj sen min lavi mi ne havis ideojn tre klarajn, ŝi ne sciis, kion fari kun mi. Ŝi montris al mi la telegramon en Esperanto, sed ĝin ŝi ne povis kompreni. Ŝi telefonis al pluraj geesperantistoj de la urbo, sed ili feris. Finfine, la aparato bonvolis konsenti al konversacio kun esperantistino, kaj, kun ŝia helpo, mi povis diskuti kun la patrino de Walter. Ĉar la brava sinjorino volis esti en la vilaĝo de sia parencaro por la tiom grava katolika festo, mi konsentis iri al Varsovio per la nokta trajno, sed petis banon, manĝon kaj liton por kapabli pluan veturadon. La farĉitaj brasikoj de la sinjorino estis bongustegaj. Ŝia loĝejo estas tiom malgranda, ke ne entenas ĝi veranlito: la liton ŝi tiris el la muro. Post kelkaj horoj da dormo, mi prenis la sandviĉojn, kiujn la sinjorino preparis por mi, kaj ŝia telefono bonvolis voki taksion. Mi reiris al la poŝtejo por sendi telegramon al Walter. Sed la gepoŝtistoj ne volis preni la telegramon en Esperanto, eksplikante, ke nekonatan lingvon ili ne povas telegrami. Ĉar mi ne scipovas la polan lingvon, en la germana mi provis diskuti. Maljuna sinjoro afable demandis min, ĉu li povas helpi, mi ĉion klarigis al li en la germana, kaj li faris telegramon en la pola lingvo por sciigi al Walter, ke mi alvenos je la sepa horo matene. Mi taksis lin optimisto.

(daŭrigota!) Jakelino

Jen aperas virga paĝomalsupro. Ni ŝtopu ĝin per iom da reklamado !

LA BOETIE

MEMVOLA
SERVUTO

Ĉe la broŝurservo, en nova vesto desegnita de S. Sire, la ĉefverko de Stefano de La Boesi - traduko de kdo ROL - "klasikaĵo por ĉiuhorizontaj liberamantoj"

32 paĝoj - 3 FF (sed mendu ĝin prefere kun aliaj broŝuroj : la afranko nun ege plialtiĝis !)

* L A R Z A K O : ekzemplodona rezisto 10-jara!

Konkludo de Léon Burguière, terkulturisto sur Larzako, kasisto de l' A.P.A.L. (Asocio por plibonigo de kulturo sur Larzako) :

"...La bilanco de la diversaj laboroj faritaj dum la somero 1980 entute estas tre kontentigaj. Pli ol 800 volontuloj partoprenis la laboron dum du monatoj kaj duono. (Estas rimarkindaj, inter la Francoj, Belgoj, Svisoj, Nederlandanoj, ktp, la multnombraj Germanoj : 410 !)

Tiu ĉi somera sperto pruvis al ni, ke per malmulte da mono eblas multon fari dank'al bona organizado de la laboroj. Ni kore dankas tiujn, kiuj donacis al ni ĉu tuton, ĉu parton de siaj ferioj - kun speciala distingo al Georges, nia sindonema kunordiganto de la laboroj. La juĝa proceduro povas rekomenciĝi, dank'al vi ĉiuj ni ne forlasos, kune ni gardos Larzakon, kaj savos la Pacon !"

En la 56a kaj 57a numeroj de "Gardarem lo Larzac" estas ege interesaj resumoj pri la larzaka rezisto kaj precizaj informoj pri la someraj laboroj.

Por helpi al la Larzakaj terkulturistoj, eblas :

* aboni al "Gardarem lo Larzac", 30FF - CCP (poŝtkonto):

GLL - 217530 S Montpellier. Adreso : Potensac, F 12100 MILLAU.

* rifuzi pagi 3% de siaj impostoj.

* resendi siajn militservajn paperojn.

* kontakti Larzak-komitaton (kunordigo : Maison de l'Agriculture, rue de Glossop, 12100 MILLAU).

* pruntedoni monon al SML (solidareca mutualismo de Larzako).

* labori dum la somero.

* Golfech

Se vi dubas pri la dolĉaĵoj kaj feliĉoj, kiujn promesas atomcentralo, iru promeni en Golfech sur la loko mem, kie nia estraro decidis konstrui atomcentralon...

Vi ĝuos pejzaĝon tute novan : ne plu da farmoj, ne plu da kulturitaj kampoj, sed almenaŭ kvin farmoj detruitaj,

terenoj dissulkitaj, sufiĉis kelkaj horoj por tion sukcesi per "belegaj" maŝinoj, kiujn vi povos admiri same kiel trezorojn, zorge garditajn de armitaj policistoj, ĝendarmoj kun hundoj, protektitaj de pikdratoj. Eĉ nokte la spektaklo pludaŭras dank'al specialaj lumoj...

Sed kiel defio, simbolo, alvoko, la okcitana flago flirtas super la tegmento de la ligna konstruaĵo - rotundo - meze de la eta tereno aĉetita de antinuklea G.F.A.

Tiu "ridinda" bieno estas vera fuorteto por rezisti. Tie eblas renkonti, helpi strangajn personojn, kiuj ne volas rezigni, kiuj preferas lukti, preferante konstrui ol detruiri, okupi ol fuĝi, defendi vivon...

Kontraŭ antinukleaj aktivuloj okazis kaj okazos procesoj en la regiono. Por pli da informoj eblas skribi al :

C.A.N. GOLFECH, 33 bd. Victor Guilhem, F 82400 VALENCE D'AGEN

aŭ aboni al la gazeto : "Le Géranium enrichi" (1 jaro : 30 FF en Francio, 40 FF ekster Francio) je la nomo :

C.A.N. GOLFECH.

kaj kompreneble ĉiu financa helpo estos bonvena !

Nicole Déjean.

VIVO DE "LAÛTE!"

La amplekso, la regula aperado (fakte 31 numeroj en 4 jaroj de post la "oficialigo" de la bulteno, t.e. preskaŭ 8 numeroj jare plus la adresaroj, fulmo !), la kreskanta nombro de la abonantaro, ĉio tio spegulas la bonfarton de "LaÛte!". La monbilanco aperonta en januaro sendube montros ankaŭ la sanon de la kaso, malgraŭ la tre malaltaj abonprezoj.

Anticipante pri la rezulto de tiu monbilanco, ni anoncis samajn abonprezojn (12/15FF) por 1981. Tiel estu !

La diferenco inter abonoj por Francio kaj ekster Francio kuŝas sur la afrankado : po 0,25 por Francio, po 0,80 por sendi eksterlanden.

Tamen, malgraŭ nia strebado al plejeble malalta abontarifo, ĝin ni devos nepre plialtigi tuj post la registrado de la reabonoj por 1981.

...

Ĉar, efektive, jen venis la "sezono" por reaboni. Pri tio

tiu ĉi decembra numero memorigas vin sur sia kovrilpaĝo, apud via adreso, per jena mencio :

Fino de via abono.....

Se vi kutime pagas alisezone, vi trovos tuj poste la daton de la fino de via abono. Ĉi-kaze vi tamen havos intereson repagi tuj, ĉar tiel vi almenaŭ ĉi-foje evitos la abonplialtiĝon.

Ni petas vin reaboni tiel akurate kiel aperas "Laŭte!". Tio rekte helpas la administradon... kaj vi povos ricevi senprokraste la januaran numeron.

Profitu la (re)abonon :

- * indikante sur via ĝirkupono la informojn, kiujn vi deziras menciitaj en la venonta "adresaro". Faru el tiu adresaro vere utilan ilon por vi.
- * donante adreso(j)n, al kiu(j) sendi provekzempleron de "Laŭte!". Tio estas la plej bona varbmaniero, ĉefe se ni sendas la specimenojn vianome.
- * abonante al la broŝura serio (se tio estas via deziro!). Pri tio legi la rubrikon "SAT-Broŝurservo".

Se vi ne volas reaboni, tio estas rajto via, profitu la okazon, skoldante vigle la prizorganton de "Laŭte!", la kontribuantojn al "Laŭte!", eĉ la nurajn legantojn de "Laŭte!" ! La plej belaj, sukoplenaj insultoj aperos en via eksbulteno kaj kontribuos al ĉies amuziĝo.

Amike kaj "laŭte" al ĉiu, Kribo.

Inter la geperantojn de "Laŭte!" bonvolu aldoni nun :
Finnlando : S.P. HURTTA, PL 221, SF-70101 KUOPIO 10.
 Kiuj havas leteramikojn en tiu mondparto, tiuj povas informi ilin pri la ebleco aboni ankaŭ en Finnlando.

La venonta "Laŭte!" aperos meze de januaro 1981a. Ĝi enhavos i.a. ĵus ricevitan kaj tre interesan debaton pri "Ĉu bankrotis racio?", enkondukitan de Patriko en la kadro de la ĉenleteroj. Pro abundo de originale verkitaj kontribuoj, ni prefere evitu tradukaĵojn !

NIA FELIETONO

Antaŭ 50 jaroj... TRA LA MONDO
 PER BICIKLO KAJ ESPERANTO

Kristnasko 1929 : labortago kiel la aliaj. Morgaŭ, normala ripoztago, estos tago de memvola kaj sensalajra laboro por la industriigo de la lando. Mi inaŭguras la esperanto-kurson.

5an de januaro 1930 : Minus 45° C, sed la laboro ne estas interrompita. La masonistoj konstruas ŝtonan ponton, skipoj riparas la fervojojn, la telefondratojn. Mi povas bicikli sur la glaciigintaj deklivoj.

(...)

8an de majo 1930. Post sennombraj malfacilaĵoj, hieraŭ mi fine ricevis mian pasporton por denove ekiri. Mi unue veturos ĝis ĈITA per trajno, ĉar la vojo ankoraŭ ne ĉie degelis. La 20an de majo, je la 8a matene, mi foriras de Ĉita per mia aparato kaj mi ruliĝas sur la reloj.

26an de majo 1930. Mi atingas la landlimon. Post du horoj mi estos en Ĉinio. La lastaj tagoj en Sovetio estis por mi la kulmino de mia tiea restado. Dum tri tagoj ĉe kamarado SUKOV mi plian fojon ĝuis la ĉarmon, la malavaron, la animpurecon de la slava gastamo. ALEVIANE, eta stacio konstruita kaj nestiĝinta piede de la grandaj krutaĵoj ĉe Anon, lasas al mi aparte nepereigeblan memoraĵon. Pradokse, la vivo tie estas pli bona ol aliloke en la regiono. Ĉu eble pro la kontrabando ? Mi kredis min reveninta en mia familio, tiel la akceptado de S. estis varmega. La patrino de mia amiko gastigis min kiel sian filon. Krome, eĉ en tiel eta vilaĝo, ĉiutage estas kino kaj balo (tiel malofta en Sovetio!) aŭ koncertoj plurfoje monate, aranĝitaj de la lokaj folkloraj kaj artaj grupoj. Post tiuj tri tagoj, mi reekiras. La tutan tagon ĝenas min forta vento kaj mi biciklas jen sur altebenaĵoj, jen en montaro. Mi laŭiras la valon de Anon. Tie ĉi tiu valo estas nur 800-1000 metrojn larĝa. Sur la flankoj de l'dezertaj montetoj oni rimarkas nur la malmultajn izolitajn kabanojn de l'Burjatoj, rondajn kabanojn kun pintaj tegmentoj, kiuj pensigas min pri tiuj de indianoj de "Far West". Kompreneble,

dissemitaj en la naturo videblas ankaŭ multaj brutaroj. Ĉirkaŭ la 11a, mi ekvidas ĉevalrajdanton, kiu fulme mal-supreniras la montdeklivon direkte al mi. Kiam li estas alveninta ĉe la trako, mi haltas kaj proponas al li konkuradon pri rapido. Li konsentas. Tiel ni vetbatalas 500-1000 metrojn sur la rekta vojo kaj mi sukcesas venki lin. Tiam la rajdanto proksimiĝas kaj mi surprize konstatas, ke temas pri belega burjata junulino, granda, bone lokita sur sia selo, kaj kiu rigardas min kvazaŭ al ali-planeda vizitanto. Mi alproksimiĝas kaj provas ekkonversacii. Ŝi rajdas grandan blankan ĉevalon sur granda kaj komforta selo, sed ne "amazono". (...)

Konstatante, ke mi ne povas konversacii kun ŝi (ŝi certe ne scipovas la rusan), mi donacas al ŝi unu el miaj kartoj, kiun ŝi akceptas kun videbla infaneca plezuro. Mi komprenas nur unu vorton el tio, kion ŝi dankante diras al mi: "jurto", kaj ŝi montras al mi la direkton Nord-Okcidentan. Evidente ŝi invitas min viziti ŝian familion kaj ŝian domon.

Pro multaj kialoj mi rifuzas tiun inviton, sed ĉefe tial ke la jurto aspektas sur la monteto tiel eteta, kiel ĉina ĉapelo, kaj ke mi ne deziras perdi tempon. Reekirante mi rimarkas la grandan stangon - plurajn metrojn longan - kun ladrimento ĉe la ekstremo, kiu tutverŝajne estas la "lazo" de tiuj bovĝardistoj.

Adiaŭ, Sovetio! aŭ eble ĝis revido? Ĉiel mi konservos neforgeseblan memoraĵon pri la 18 monatoj, kiujn mi pasigis en Sovetio, kie, tagon post tago, mi travivis kaj notis la ĝojojn, la malĝojojn, la suferojn sed ankaŭ la esperojn de tiuj grandaj gastamaj kaj laboramaj popoloj. (Tion mi skribas lundon 26an de majo 1930 en la stacio MASEJEVSKAJA.)

* *
*

(daŭrigota)

Alfa-Beta

*
* Jam de februaro 1978 "Laŭte!" plejeble regule *
* aperigas la ĉi-supran "felietonon". Ni pardon- *
* petas la novajn gelegantojn, kiuj ne povis legi *
* ĝin de la komenco. Ha, se ili estus konintaj *
* "Laŭte!"n pli frue!
*

Pri strategio kaj taktiko de nia asocio (SAT)

Aŭdiĝas voĉoj, ke SAT senliĝis kaj ties ideoj arkaikiĝis. Laŭ mia kompreno tiuj asertoj nur parte pravas. La kerna idealo de SAT sanas: Esperanto estas liberiga movado tuthomara.

Tamen la vorta formulo de niaj celoj malmoderniĝis, ili sonas strange kaj malnovisme. SAT naskiĝis kiel antitezo al furiozanta naciismo; Lanti suĉis sian ideologion el la amara spertoj de la unua mondmilito, en kiu li servis kiel ambulancisto.

Per Esperanto - kaj konkrete per SAT - Lanti celis unuavice al la liberigo de la laboristaro el la katenoj de kapitalisma ekspluatismo kaj ŝovinisma tiranismo. Ĉi ĉion oni devus reformuli por pli bone respondi al la postuloj de la nuntempo: anstataŭ "laboristo" ni parolu pri "laborulo" (laborulo = ulo karakterizata per laboro, do laboristo, instruisto, oficisto, metiisto k.a., diference de veraj fikapitalistoj, parazitaj, burokratoj), kvankam mi konfesas, ke al la vorto "laboristo" rilatas tre emociaj sentoj eĉ en la grado, ke la laboristo povas senti sin subigita per laŭdoj. Do, SAT devas strebi al emancipo de la laborulo (aŭ de la homo) per klerigado kaj uzado de Esperanto.

La "sennaciismo" kaj "sennacieco" estas vortofantomoj, tre karaj al SATanoj kompreneble, sed ili timigas homojn, do ilia konstanta uzado estas taktika eraro, psikologia malhelpo. La teknologoj ne faras al si tian penon, ekz. la varoj estas vere sennaciaj, ju pli komplikaj des pli sennaciaj. Esperanto estu nomata ne sennacia lingvo, sed supernacia lingvo. Same ni ne babilu pri la anstataŭigo de la naciaj aŭ etnaj lingvoj per Esperanto, ĉar tio okazos per si mem kun la paso de sufiĉe longa tempo (1000-10000 jaroj), se la homoj tion deziras, sed en la nuna fazo de la evoluo de Esperanto la "kapacito" de ĝia esprimkapablo simple ne sufiĉas por kontentigi ĉiun bezonon. Do, estas taktika eraro kontraŭmeti Esperanton al precipe popolaj lingvoj, tamen kontraŭmeti ĝin al la imperiismaj lingvoj angla, franca, rusa kaj germana povas laŭokaze esti efika ago. Kompreneble, ankaŭ tiuj lingvoj estas popolaj en siaj respektivaj landoj, sed en aliaj landoj ili estas agresa funelo por verŝi "valorojn", por kateni kaj rabi la fruktojn de alies laboro.

Do, oni debatu dum sekvaj jaroj larĝe kaj vaste pri la celoj kaj metodoj de SAT, precipe surbaze de la kerna idealo : Esperanto - liberiga movado tuthomara, kaj oni faru adekvatajn ŝanĝojn al la programo, kaj oni reformulu ankaŭ la nomojn de la asocio kaj la gazetoj. Ekz. jene : Laborula Asocio Tutmonda (LAT), Laborulo (Sennaciulo) kaj Labor-Revuo (Sennacieca Revuo). Tiel ni pli klare distingigu por labori por niaj propraj celadoj, dum la kunlaborado en la disvastigado de Esperanto kun UEA estus pli laŭcela kaj harmonia.

S.P. Hurtt

Raporto pri la Internacia Renkontiĝo de Junaj
 Geesperantistoj en VILLENAVE D'ORNON (Ĝirondio)
 11/12.de Oktobro 1980.

Malgraŭ la malmulteco de la partoprenantoj, la kunveno estis tre interesa pro la multaj temoj debatitaj kaj ĉefe pro la agoj konsiderataj...

La unua problemo temas pri la malbona informado en direkto al la ekstero, ĝis la popolo ne-esperantista - kio cetere koncernas ankaŭ la Esperanto-Movadon mem. Ekzemple, multaj E-renkontiĝoj interesaj ĉi-jare okazis tra Eŭropo kaj oni ne scias pri ilia esto. Kelkajn proponojn pri tio oni elmetis. Pri la propagando ekster la E-movado bona solvo estus broŝuro, kiu informus vere pri ĉiuj esperantistaj okazaĵoj tra Eŭropo aŭ la Mondo ; ankaŭ pri la E-institucioj tra Francio. Tiu broŝuro evidente devus esti malmultekosta por esti plejeble disvastigita. Iu kamarado diris, ke li povus zorgi pri presado de la broŝuro kun la helpo de parizano presisto.

Pri la cirkulado de informoj tra E-movado necesus sama malgranda broŝuro. Ĝi devus enhavi ĉiujn esperantistajn okazaĵojn (renkontiĝoj, teatraĵoj, festoj ktp...) kaj ankaŭ adresojn de la personoj, kiuj povas havigi aliajn informojn. La financado de tiu broŝuro estas problemo. Ĉiuj partoprenantoj sugestis, ke SAT kaj UEA devos interhelpi en la presado por pli facila grupigo de la informoj

kaj unuigo de la klopodoj.

La dua temo koncernas pli rekte la celon de ĉi tiu speciala renkontiĝo. Vere, ne ekzistas renkontiĝo de junaj geesperantistoj tra Francio, kaj precipe periodaj renkontiĝoj. Tia tipo de renkontiĝoj ebligus akcepti la novajn esperantistojn kaj ankaŭ proponi aliajn agadojn koncernantajn la E-movadon. Do, la ĉefa laboro de la renkontiĝo estis : trovi alian lokon por renkontiĝi denove. Kamarado proponis lokon en Normandio la 11an de Novembro. Tiu propono estis akceptita de ĉiuj kunvenantoj. Aliaj lokoj eblaj : en Cevenoj, vasta farmo kontraŭ luprezo tre malmultekosta ; en "Les Moulins des Apprentis" (Muelejoj de Metilernantoj) (pli facila afero, ĉar la E-movado povas uzi unu el la muelejoj) ; kamarado elvokis eblan renkontiĝon de junaj geesperantistoj en Avignon (julio 1981)...

Sed precipa propono konsistis en organizo de renkontiĝo okazanta ĵus antaŭ la venonta kongreso de SAT-Amikaro, por tiel maksimume allogi la junajn partoprenantojn en la SAT-Amikara Kongreso. La plej bona loko estus en Annecy mem, aŭ apud tiu urbo (ni petas de ĉiuj legantoj, kiuj povas helpi nin pri tio, bonvole kontakti la kamaradon subskribanton. Dankon !)

Koncerne la programon de tiu renkontiĝo, la partoprenantoj proponas :

- promenadojn (piede kaj bicikle) tra la Alpoj.
 - organizon de amuzaĵoj (skeĉoj, teatraĵoj, kantoj, ktp)
 - starigon de diversaj debatoj.
 - eldonon de speciala numero de "La Juna Penso" raportanta pri la renkontiĝo kun la helpo de la samaj esperantistoj (skribi artikolojn pri tio, raportoj pri la debatoj kaj la okazaĵoj, eble organizi la presadon mem surloke)
- Kamarado, unu el la respondeculoj de la revuo, favoras tiun proponon.

Kvankam la renkontiĝo estus organizata ĉefe por la Junul-Fako de SAT, ĝi tamen estus malfermita ankaŭ al ĉiuj junaj geesperantistoj nemembroj de SAT.

Poste, grava debato okazis pri "La Juna Penso" mem : Kamarado insistis pri dissendado de speciala demandaro al la legantoj por scii fine, kiuj povus partopreni pli aktive en la vivo de la gazeto (redakti artikolojn, traduki tekst-

ojn el naciaj lingvoj).

Interesajn artikolojn publikigitajn en revuoj neesperantistaj oni devus diskonigi per tradukado. Tiucele, kamarado parolis pri la ekologia revuo "La Hulotte". Sed tia propono starigas la problemon pri la pli aktiva partopreno de ĉiuj. Oni devas disvolvi la kontaktojn, por ke la laboro ne refalu sur nur kelkajn el ni. La vivo de la gazeto dependas de tio !

Iu kamarado sugestis, ke la E-instruistoj helpu nin komunikante la adresojn de siaj junaj gelernantoj, kiuj devus aboni al la revuo.

Jen la precipaj temoj de la renkontiĝo. Ni esperas, ke la debatoj, tre longaj kaj interesaj, havos praktikan sekvon, kun la helpo de ĉiuj.

Por la grupo de la partoprenantoj : Michel BAURET
adreso : 17 str. Utrillo, F. 33140 VILLENAVE D'ORNON.

* Aldono de Christian Baudé, baldaŭ eksresponsulo leĝa de *
* "La Juna Penso", en formo de "Alvoko al ĉiuj!" : *
* *****

Jam de longe mi anoncis al la prizorgantaro de "La Juna Penso" pri la neceso anstataŭigi min kiel leĝan respondeculon de LJP nepre ekde la 1a de januaro 1981. Laŭdire de ĉeestintoj en Rijeka (ĉi-jara SAT-kongreso), oni eĉ ne aludis pri tio en la ĉi-jara junulfaka kunsido. Restas apenaŭ kelkaj semajnoj, kaj LJP, kiu jam perdis definitive la periodaĵan statuson/statuton en Francio, riskas eĉ ne plu havi leĝan reprezentanton, do, laŭ la francaj leĝoj pri la gazetaro, ne plu leĝan aperrajton. Mi do petegas unu el la gejunuloj, kiuj volas pluvivigi la junulfakon, sin proponi por tiu leĝa respondeco - fakte postulanta preskaŭ nenium laboron! - tuj sin proponi, rekte skribi al mi aŭ min viziti se eblos, por ke ni kune tuj ordigu la aferon antaŭ la fino de decembro ĉi-jara. Se plaĉos al iuj, tiu afero povus esti okazo de gejunula renkontiĝo en la konata loko "Moulin de Carguessac" en Beauville (Lot-Garonio), sed mankas tempo por ion aranĝi nun. Tamen ĉiam eblas tendumi kaj eĉ tranokti en la muelejo mem. Nura problemo : mankas hejtilo, sed oni povas elturniĝi... Antaŭdankon al la bonvoleml(in)o!

Christian Baudé, Gare SNCF, F 47340 Laroque T.
tel: 16 (58)95 71 28

Jen kelkaj novaĵoj pri la vivo de la broŝurservo. Vi mem juĝu, ĉu ili estas bonaj, malbonaj, aŭ - hm! - seninteresaj.

- * La dua eldono de "Kiel diri...?" estas elĉerpita. Mendoj tamen estas plu bonvenaj, ĉar ili ebligas fiksi la kvanton da ekzempleroj preparotaj okaze de la 3a eldono, kiu aperos - ni ne fanfaronu!... - printempe de 1981.
- * La nombro da broŝurabonantoj regresis en 1980 (74 anstataŭ 91 en 1979). Tiu regreso parte fontas el manko de kontaktoj kun la personoj, kiuj antaŭe abonis pere de LJP. Tamen la mendoj restis sufiĉaj por plu teni vigla la eldonadon.
- * Kiuj deziras ricevi senmanke ĉiujn novajn broŝurojn, tiuj prefere fariĝu abonantoj, ĝirante minimuman monprovizon 50-frankan, kiu ĝis sia elĉerpiĝo rajtigas ilin ricevi la novajn eldonaĵojn (kun 20% da rabato).
- * La eldonprogramo por 1981 estas nun fiksita :

- "El verkoj de Leo Tolstoj" (sekvos recenzo)	VT. 6FF
- "Inter Sovetaj Popoloj" de P. Diksztein, 350 paĝoj en du volumoj (eĉoj el la "Gulag")	IS.20FF
- "Naciismo kaj Esperantismo" (S.Aarse)	NE. 5FF

 VT estas jam disponebla, IS estas nun parte tajpita kaj aperos espereble printempe de 1981, NE aperos iom poste.
- * Jarbilanco aperos en venonta "Laŭte!", por ke ĉiu monprovizanto, kies fideleco konkrete garantias plufunkciadon de la afero, povu juĝi kiel ĝi statas. Aliajn konkretajn helpojn la broŝurservo ricevas per kontrolado de manuskriptoj (apartan dankon al kdoj ROL kaj VALO, kiuj konsentis zorgi pri IS - nefacila tasko, sed interesoplena dokumento, laŭ la lingvokontrolintoj mem), surloka faldado kaj folikolektado (estu benitaj la ĉiam helpopretaj Nicole kaj Ginette kaj la fervora Suzana, ĉiuj, kiuj, eĉ okaze de mallonga vizito en Laroque, iel partoprenas en tiu frenez(ig)a eldonafero !
- * Memorige : de nun uzi la novan adreson kaj la novan poŝtkonton por la broŝurmendoj aŭ -abonoj, nome tiujn validajn por "Laŭte!": Cercle espérantiste de l'Agenais, pĉk n-ro 3371 74 M Bordeaux. (Baldaŭ malaperos la poŝtkonto de LJP en Bordojo).

* Nun pri la kostoj : La eldonkostoj feliĉe ne tro multe kreskis en 1980 (tio ja supozigas, ke ili nepre baldaŭ plialtiĝos!). Male, la afranko, ĉefe por sendado de broŝuroj en Francio, nun estas tre peza kompare kun la vendoprezio de la broŝuroj. Kvankam por 1981 plu validos la "regulo", laŭ kiu la prezioj "inkluzivas la afrankon por minimume 25-franka mendo", post 1981 necesos ĝin forlasi aŭ adapti. Geklientoj! Viaj sugestoj estas bonvenaj por plej taŭge solvi la problemon !

- ĉu plialtigi la vendoprezion ?
- ĉu pagi sisteme la afrankon al la mendantoj ?
- ĉu alie elturniĝi ??

Dankas pro via atento,

Kribo

Ni ne forlasu la paperaĉajn temojn. Jen trafa reago, kiun naskis la tiusezona foli-falado... en la leterkestojn...

Ĝisrande pleniĝis la pokalo !

Aparte en tiu periodo de la jaro, ĉiutage mia leterkesto pleniĝas per grandformataj kovertoj, kiuj per laŭtaj supresitaĵoj* petas, petegas, admonas min : "Malfermu tuj! mirinda donaco! nekredeblaĵo! ne preterlasu la fabellan favoron..." Se ankaŭ vi suferas pro tia superŝuto de teda reklamado, se ankaŭ vi taksas ĝin senutila fuŝado de materialo, tempo kaj mono, kaj se vi serĉas efikan (?) reagon, mi konsilas al vi uzi glumarkojn eldonitajn de ekologia revuo "Combat Nature", BP.80, 24003 PERIGUEUX. Ili tekstas (franclingve) :

Kontraŭ la malŝparado de papero
Resendo al la sendinto.
Kampanjo kontraŭ hejmkampanjo.

→ kun bildo de
kuŝanta,
dehakita arbo.

Eble vi jam konas kaj uzas ĝin. Se ne, vi povos mendi ĝin (10 folioj de po 6 pecoj por 15 FF). Per nur 25 centimoj, vi tiel povos atesti pri via pokalplenpleno.

Paul kaj Ginette Signoret.

* ne ridaĉu, plu legu ! Ne estas vortludo ĉi tie. (red.)

Ne forgesu reaboni la mirindan, nekredoblan "Laŭte!" por 1981! Ne forgesu, ktp, ktp... (mistrafa vorto!)

La ĉi-suba artikolo aperis en la brita ĵurnalo
"Daily Telegraph" la 21an de oktobro 1980 :

La Brita Konsilio donas antaŭrajton al Pekino

"British Council" esperas plivastigi sian aktivadon en Ĉinio en la 1980-aj jaroj, kie nuntempe troviĝas la plej granda ekspansiigebla merkato por la angla lingvo, laŭ Sir Charles Troughton, prezidanto de la Brita Konsilio.

Sir Charles, kiu nuntempe vizitas Ĉinion, diras, ke ĝi estas la ununura parto de la buĝeto ĉijare nereduktita de la Konsilio. Li aldonas, ke la disvastigo de la angla lingvo, kune kun la interŝanĝado de studentoj, estas la ŝlosilo ero en ĝia programo.

La britaj civitanoj, ĉu profesiuloj, ĉu laboristoj, subvencias per impostoj la popularigon de sia lingvo en fremdaj landoj, por ke ĝi fariĝu fine la sola fakta internacia lingvo. La britoj tion faras foje senŝcie (ne konante la Britan Konsilion, kies ĉefa celo estas la disvastigado de la angla) aŭ eĉ kontraŭvole (esperantistoj, kimralingvanoj ne estas ĉiam tiel arogantaj, ke ili volas trudi sian lingvon al alilandanoj!).

La Brita Konsilio kaj ĝia frata propagandinstanco, BBC, bone konstatas, ke se ili sukcesos en Ĉinio, la angla lingvo fariĝos tiel potenca, ke baldaŭ ĉiuj fremdaj popoloj estos devigataj lerni la anglan. Krome tiuj instancoj esperas, ke baldaŭ la anglalingvanoj mem ĝuos la avantaĝon neniam denove devi lerni fremdan lingvon !

La usonanoj jam planas lanĉon de paralela kampanjo por sia dialekto de la sama lingvo.

Ni devas fidi al niaj ĉinaj amikoj kaj kamaradoj, ke ili ne permesos tiun lingvan imperiismon, malgraŭ la fakto, ke ĝin remburas la multmilionoj de riĉaj registaroj !

Esperanto proponas la manon de amikeco - sen ponardo en la alia mano ! Necesas forta reago fare de esperantistoj : skribu amase al Ĉina Esperanto-Ligo, Pekina Radio kaj al la registaro de Ĉina Popola Respubliko, avertante pri tiu insida imperialismo !

Informo transsendita de

Esperanto-Centro Hillingdon

(Britio)

Senpage por la abonantoj
kaj -tinoj de "Laŭte!" :

* Anoncetoj *

Grupo de junaj saksaj E-gelemantoj de la distriko de
Dresdno (GDR), aĝantaj inter 10 kaj 14 jarojn, serĉas
gekorespondantojn. Sin turni al Jacqueline LEPEIX,
82 avenue Jean Jaurès, F 67100 STRASBOURG.

Mia broŝureto, proks. 30 tajpitaj folioj : "La maniero,
kiel Dio estis inventita", ne estas, per mia nura pro-
pra kapablo, eldonebla en 2500 aŭ 3000 diversaj regionaj
lingvoj de la nuna mondo. Tial mi ĝin kreis en esperanto,
por ke la interesatoj povu ĝin traduki... La mondo en-
havas proks. 3 000 000 esperantistojn. Pro tio, mi opi-
nias, ke la eldono estus interesa.

Se vin interesas unu broŝureto en esperanto por vi mem,
aŭ ĝia eldono, petu ĝin (kun sendkostoj, neregistrite)
kontraŭ 25 FF al : TRENNER, 166 avenue Daumesnil,
F 75012 PARIS. Poŝtkonto PARIS 3 941 39 T.

Cele eventuale eldoni broŝurforme tiun dokumenton, kiun
liveris E. Lanti felietone en "Sennacieca Revuo" de 1922/
1923, mi petas de SAT-pioniroj, kiuj povus pruntedoni
ilin al mi jenajn numerojn de "Sennacieca Revuo" :

- januaro 1923 kaj - februaro 1923

en kiuj troviĝas lia rakonto "Tri semajnojn en Rusio".
Mi posedas la 5 ceterajn numerojn, en kiuj aperas tiu
felietono. Mi pagos la necesan afrankon.

C. Baudé, SAT-broŝurservo, F 47340 Laroque Timbaut.

----- Ne trovis lokon en la rubriko "E-vivo" : -----

La "Tuluza Societo por Esperanto" festos la Zamenhof-
Tagon dimanĉon 14an de decembro, je la 14a en "Centre
Culturel des Minimes" (Mairie-Annexe), 6 rue du Caillou
Gris, en Tuluzo. Aliĝojn ricevas, kun 10-franka antaŭ-
pago por la lunĉo : R. Albault, 14 av. du château d'eau,
31300 TOULOUSE (skribi antaŭ la 10a de decembro kaj evt.
proponi ion kiel partoprenon en la programo).

Informo ricevita en la franca, fulmo! Imagu, se la red.
estus nur serbkroata lingvano !

Italio : La 14an de decembro 1980 en Florenco ĉe
***** la sidejo de Anarkista Florenca Movado
la Esperantista Florenca Asocio organizos kunven-
non pri Esperantismo.

Kelkaj postaj vortoj de la red. :

Pro abundo de la "materialo", kaj kvankam mi prokrastis la
publikigon de la debato "Ĉu bankrotis racio ?" ĝis januaro,
pluraj apartaj artikoloj ne povis aperi en tiu ĉi numero.
La kontribuintoj vidu en tio ne ian cenzuron - fi al tiu aĉa
besto ! - sed la simplan fakton, ke "Laŭte!" havas kelkajn
problemojn pro sia kreskado. Tial, unuavice ni loku en la
gazeton la originalajn tekstojn, nur duavice kaj se eblos,
la tradukojn kaj represaĵojn. Kribo.

la kastelnova grupo



E-VIVO

Zamenhof-tago en Girondio

Ĉi-jare, nia grupo proponas sin por organizi la ZAMENHOF-TAGOn, kiu, kutime, grupigas multajn samideanojn el pluraj departementoj de Akvitanio.

Ĝi okazos en EYSINES (Centre Aéré du Pinsan, rue M. Attoune), apuda urbo de Bordoza, en tre agrabla loko, meze de arbaro. Tiu ĉi apartenas al "Amicale Laïque" (Laika Amikaro) de la komunumo, kiu entenas Esperantan Sekcion.

Nia renkontiĝo okazos la 21an de decembro de la 10a ĝis la 16a.

La manĝo, mem preparita de nia grupo, kostos po 20 aŭ 25FF.

Ni deziras malfermi nian renkontiĝon al neesperantistoj, simpatiantoj de nia agado. Pro tio, ni invitas ĉiujn personojn, kiuj interesiĝas pri esperanto. En nia programo, ni antaŭvidos diskutadon esperantlingve kaj ankaŭ franclingve.

PROGRAMO

10H30 - 12H : Diskutado per grupetoj :

- pri esperanto (franclingve)
- vivo en la departementoj (esperantlingve)
- provkurso por komencantoj, ktp...

12H : Manĝado. Je la fino de la manĝado, oni povus pripensi animadon. Ekz.: rakontoj de E-travivaĵoj, kantoj, ktp.

Posttagmeze, laŭ la vetero : ĉu migrado en la arbaro, ĉu diapozitivoj, ĉu ...??? laŭ viaj proponoj !

16H : ordigo de la loko.

Por la grupo, J.Lajus.

-----bonvolu resendi tiun slipeton al J.Lajus, Ecole,-----	
-----33620 Cavignac-----	
NOMO	Adreso
Mi partoprenos la Zamenhof-tagon	
en EYSINES, sola/kun...personoj.	
Mi venos per trajno/per aŭtomobilo	
(Se tro etas la slipo, bonvolu skribi tiujn informojn sur	
io malpli liliputa -- red --)	

Esperanto-kurso en Montauban

Post inform-kunveno kvin novaj personoj komencis la lernadon de Esperanto, inter ili du liceanoj, unu Svedino kaj unu Anglino. Ĉiun merkredon okazas la kurso je la 17a en la kulturdomo de Villebourbon, en Montauban. Ĝis nun estas sep gelemantoj.
N.Déjean.

Renkontiĝo en Carcassonne

Dimanĉon 26an de oktobro, je la 11a matene, antaŭ la ĉefa pordego de la praurbo Carcassonne, alvenis ĉirkaŭ 30 geesperantistoj. Organizita de la Tuluza grupo, tiu amika renkontiĝo ebligis al la membroj de diversaj grupoj de la regiono, ke ili pli bone interkonatiĝu. Post komuna manĝo, la partoprenintoj vizitis la kastelon kaj remparojn de la urbo. La belega vetero, kvankam kun iom tro da vento, estis tute favora, kaj ĉiuj estis tre kontentaj pri tiu agrabla kaj amika dimanĉo.

Tri gazetoj (La Dépêche, L'Indépendant, Le Midi Libre) raportis pri la renkontiĝo en siaj lokaj rubrikoj (Carcassonne).
S.Authier.

Strasburgo-Neudorf

Ĉe kvartala asocio ARAN, sur strateto de Noémy, apud stratego Polygone, ĉe bushaltejo Saint-Urbain, informservo pri Esperanto funkcios, ekster la periodoj de lernejoj ferioj, ĉiun lundon de la 17a ĝis la 19a horo, por :

- akcepti la esp-istojn el aliaj urboj, kiuj deziros viziti Strasburgon kun la akompano de strasburga esperantisto (eblas gastigado).
- informi pri E-aranĝoj najbaraj (Elzaco, Loreno, proksima Germanio, Luksemburgio, Bazelo) kaj plej gravaj internaciaj renkontiĝoj.
- informi neesperantistojn pri E kaj la maniero ĝin lerni.
- certigi la funkciadon de la E-biblioteko de ARAN.

Herrenberg (Germanio)

De la 24a ĝis la 28a de oktobro okazis 4 kursoj kun diversaj niveloj.

Karlsruhe

Dek homoj lernas E-on ĉe la popola altlernejo per metodo "Taschenlehrbuch Esperanto", de Till Dhalenburg kaj Peter Liebig, eldonita de Enzyklopädie en Leipzig. La grupo de Karlsruhe kunvenas monate kaj informas pri tio en gazetoj "Dampedei" kaj "Kik". Informojn oni povas akiri de Roland SCHNELL, Kaiserstr.5, 7500 KARLSRUHE, tel. 0721/69 87 67.

Geel (Belgio)

De la 31a de oktobro ĝis la 2a de novembro okazis kunveno por gejunuloj.

Nancy

La 15an kaj la 16an de novembro okazis staĝo kun diversaj niveloj ĉe Junuldomo "Philippe Desforgues", avenue de la République. Grupo D traktis la verkon "Metropoliteno".

Langen (apud Frankfurt/main)

De la 21a ĝis la 23a de nov. okazis seminario de E en la naturdomo. Ĉi-foje oni povis greke muziki, danci kaj manĝi.

Sensenstein (Germanio)

De la 27a de decembro ĝis la 3a de januaro okazos :
- 24a internacia seminario de junuloj malpli ol 25-jaraj
- 2a internacia festivalo de mezaĝuloj (inter 26 kaj 50 j.)
Temo de ambaŭ estos : alternativaj vivmanieroj.

Stuttgart

Sabaton la 6an de decembro je la 17a horo okazos Zamenhof-festo en naturdomo Fuchsrain, Neue Strasse 150, Stuttgart-Ost.

La Chaux de Fond (Svisio)

Staĝoj okazos(is) : - la 15an kaj 16an de novembro ; - la 24an kaj 25an de januaro 1981 : tiam la supera kurso studos romanojn de Jean Forge.

Eblas tranokti en gastejo Edmond Privat, ricevi matenmanĝon kaj vespermanĝon, kaj tagmeze manĝi fonduon.

Ĉi-suprajn informojn donis J.Lépeix.

Esperanto kaj bretona lingvo

Okaze de la nova jaro, la Renna Esperanto-Klubo (9 square de Provence, F 35000 RENNES) kunlabore kun la bretonlingva asocio "Kuzul ar Brezhoneg" ĵus eldonis sian sesan kaj sian sepan festkarton en du lingvoj : esperanto kaj la bretona. La prezoj kun sendkostoj estas en Francio : 3,70 FF por 1 ; 25,20 por 10 ; 46,30 por 20 ; 101,30 por 50 ; 179 FF por 100 ; 313,10 por 200.

La Zamenhofa Festo en Rennes okazos la 12an de decembro.

Interesatoj, legantoj de "Laŭte!" rilatu kun Renna E-Klubo.

Zamenhofa Tago 1980 en AVINJONO

Denove, ĉi-jare, AVINJONO havos la plezuron akcepti vin la dimanĉon 14an de decembro 1980 en :

"Centre de Loisirs Léo Lagrange - CHATEAUNEUF DE GADAGNE"

Tiu vilaĝo situas sur la nacia vojo n°100 inter Avignon kaj Isle sur Sorgue.

Ni proponas al vi la saman horaron kiel pasintan jaron :

- de la 9a ĝis la 10a : akcepto.
- de la 10a ĝis la 12a : prelegoj, prelegetoj.
- je la 12a kaj duono : komuna tagmanĝo.
- de la 14a ĝis la 16a : diversaj aranĝoj.

Ne okazos ekzamen-sesio, por ke ĉiuj bone profitu la bonan etoson.

Tiuj, kiuj jam enskribiĝis al CAU en Aix estos aŭtomate

la unuaj aliĝontoj al la Z.T. en Gadagne. Atentu bone !

Nur la unuaj 50 aliĝontoj rajtos partopreni en Gadagne.

Dek tagojn antaŭ la Z.T. vi ricevos la programon kaj

ĉiujn necesajn sciigojn.

Por la malproksimuloj eblos tranokti en Gadagne sabat-

vespere kaj dimanĉvespere. Tie troviĝas 5 dultaj ĉambroj.

Ne eblos ricevi vespermanĝon nek matenmanĝon. Sed, kompren-

eble, vi rajtos manĝi vian propran manĝaĵon !

Telefonnumeroj : GENTE (90)88 57 49

HUMM (90)86 18 56

MOTTO (90)82 59 36

El "Esperanto Vaucluse"